n-ro 3, Januaro-Junio 2012

# ESPERANTO*INFO

*Informilo de Kataluna Esperanto-Asocio

Mi havas la senton, ke 2012 estas tre malaktiva jaro. La kvanto da aliĝintoj al nia ĉiujara Internaciisma Renkontiĝo preskaŭ duoniĝis, kaj mi ne havas senton, ke ni okazigis aparte kontentigan aranĝon. Tamen, kolektinte tekstojn por fari tiun ĉi informilon, mi vidas, ke mia sento estas tute erara. Aro da etaj aranĝoj okazintaj la unuan jarduonon estas ja tre fruktodonaj.

Krom ĉiuj ĉi aranĝetoj, la nepoj ja benos la instruistojn de Esperanto, ĉefe tiujn de la barcelonaj kursoj en nia sidejo ĉe CIMEN. Ili sukcesis krei grupon amika, aktiva, kaj aranĝema.

Ferriol Macip


**ESPERANTO*
CAT**

*Associació Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Asocio

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Kotizoj por la jaro 2012:
individua abonanta membro, 64 eŭroj;
pensiuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta membro, 128 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Enginyers,
Agència 001, Barcelona
Kontonumero: 3025 0001 15 1433398158
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158
UEA-konto: kaea-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato:
Prezidanto: Carles Vela;
vicprezidanto: Josep Franquesa;
kasisto: Sebastià Ribes; voĉdonantoj:
Àngels del Pozo, Llibert Puig, Montserrat Franquesa kaj Ramon Perera.



Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental),
Països Catalans/Kataluna Landaro
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633
Ret-adreso: info@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat


## KOMERCO KAJ ESPERANTO EN ĈINIO

La pasintan 26an de oktobro, nia samasociano Josep Franquesa vojaĝis al Ŝanhajo akompanata de sia filo por viziti la internacian foiron EPC. Dum la evento akompanis ilin ĉinaj esperantistoj kiuj rolis kiel tradukistoj. La rezulto estis kontentiga kvanto da kontaktoj kun ĉinaj firmaoj. La kompanio de Franquesa importadas hidraŭlikan tubon de antaŭ 7 jaroj, kaj ekuzis komerce la internacian lingvon antaŭ 46 jaroj kun japana entrepreno.

La 29an kaj kaj la 30an de oktobro ili aktive partoprenis la 5an Jarkunvenon de Ĉinaj Esperanto-komercistoj de IKEF-Ĉinio, okazinta en la urbo Hangĝoŭo, ĉefurbo de la provinco Ĝeĝjango. Ili prelegis pri sia komercado pere de Esperanto dum 46 jaroj kaj pri la principaro de Kataluna Esperanto-Asocio. Tiu lasta prelego starigis interesan kaj abundan demandorondon de la ĉinaj partoprenantoj kiuj ĝenerale ne konas la katalunan realon kaj kies medio ne spertas senton por lingvaj rajtoj.

Elstaris en la aranĝo la itala vino Saluton importata de Xiamen Chine Ko Ltd., per kiu oni tostis la finon de la jarkunveno dum oni anoncis, ke venontjare la aranĝo okazos en la urbo Ĉanŝo, en la provinco Hunano.

## EKSPOZICIO "JAUME VILADOMS. LABORO, KULTURO KAJ ENGAĜIĜO"

La pasintan 11an de januaro estis inaŭgurita en Barcelono ekspozicio pri la pedagogo, socia batalanto kaj esperantisto el Sabadell, Jaume Viladoms i Valls. Prezentis la ekspozicion la historiisto Eduard Masjuan, aŭtoro de la libro *Jaume Viladoms. Record homenatge al mestre i lluitador social*. Partoprenis en la aranĝo ankaŭ la ĝenerala sekretario de la sindikato UGT Josep Maria Álvarez kaj la urbestro de Sabadell Manuel Bustos.

La ekspozicio estas vizitebla en la sidejo de la sindikato UGT de Katalunio, Rambla de Santa Mònica 10, Barcelono.

Laborista aktivisto kaj disidento de la reĝimo de Franco, Viladoms dediĉis sian vivon al la instruado de sciencoj, huma-



nismaj studoj, materiismo kaj Esperanto ĉefe al proletaro, kaj tial li estis persekutita de la frankismo.

Okaze de la 50-a datreveno de la lernejo Jaume Viladoms kaj de la omaĝo fare de la urbo Sabadell, la skipo de KIS-TV, film-novaĵa servo de Kataluna Esperanto-Asocio, kreis 9-minutan filmeton.

## KURSO PRI ESPERANTO KAJ KOLEKTIVISMO EN VALENCIO

La laborisma kaj popola ejo Francesc Santacatalina de Valencio proponas, ekde la 16a de januaro, kurson kombinantan la instruadon de la internacia lingvo Esperanto kun kurso pri kolektivismo. La lecionoj okazos ĉiun lundon inter la sepa kaj duono kaj la naŭa vespere.

La laborisma kaj popola ejo Francesc Santacalina situas en strato Salvador Ferrandis Luna, 43, en L'Olivereta-Nou Moles. Ĉiuj kursoj proponataj de la ejo estas senpagaj.

## REDONI LA NOMON DE RAMÓN FERNÁNDEZ JURADO AL LA URBA ĈEFA BIBLIOTEKO

La Magistrato de la urbo Castelldefels forigis la nomon ″Ramón Fernández Jurado″, elstara esperantisto kaj socia aktivulo, de la urba biblioteko, okaze de translokigo. Ramón Fernández Jurado, krom elstara esperantisto, estis poeto kaj rakontisto en la kataluna, en la hispana kaj en Esperanto. Li naskiĝis en Andaluzio kaj estis ekzemplo de socia integriĝo en Katalunio. Lia persono iĝis kultura heredaĵo de la urbo Castelldefels. Li elstaris pro sia kontraŭfrankisma agado. La biblioteko havis lian nomon dum 25 jaroj.

Nuntempe regas la magistraton de Castelldefels la Popola partio, kiu regas ankaŭ en Hispanio. Tiu partio, en kiu multas familianoj de gravuloj dum la diktaturo de generalo Franco, ankoraŭ ne trovis la okazon kondamni la diktaturon kaj konsideras maloportuna ĉian omaĝon al agintoj kontraŭ ĝi.

Kataluna Esperanto-Asocio aliĝas al la civitana protesto de la urbanoj kiuj deziras restarigi la nomon de Ramón Fernández Jurado al la urba biblioteko kaj organizis la sendadon de protest-retletero al Sr-o Manuel Reyes, urbestro de Castelldefels.

## ESPERANTO EN MEZLERNEJA ANGLA SEMAJNO

Ankaŭ Esperanto estis reprezentita dum la ĉi-jara English Week [″Angla Semajno″] en mezlernejo Serrallarga, de Blanes, kie jam antaŭ jaroj ĝi estis oficiale instruita kiel devige elektebla lern-objekto*.

De la 13a ĝis la 17a de februaro, per ekspozicioj, prezentadoj, teatraĵoj kaj aliaj, la angla, deviga objekto por ĉiuj lernantoj, eliris el klasĉambroj kaj inundis manĝejon, bibliotekon, koridorojn kaj ĉiujn ejojn ĝenerale.

Sed ne nur la angla havis sian lokon, ankaŭ la franca, la germana kaj, kiel jam dirite, Esperanto havis okazon por prezenti sin antaŭ lernantoj, instruistoj kaj vizitantoj.

Esperanto estis reprezentita per bone videbla informa plafono situanta en strategia trapasejo kaj ekspozicio de naciaj kaj internaciaj publikigaĵoj en la lerneja biblioteko.

Almenaŭ deko da lernantoj prenis slipeton kun retadresoj por informiĝi pri la lingvo, la movado en Katalunio kaj kursoj.

Pedro M. Martín

* Vidu sur *Kataluna Esperantisto* n-ro 305(72), p. 3.

## RAKONTENDA SEKRETO

La kataluna muzikbando Brams ĵus eldonis sian lastan videofilmon surbaze de la kanto “Un secret que t'havia de dir” [″rakontenda sekreto″] el la lasta albumo, *Oferta de diàleg* [″dialog-propono″] (2011), reĝisorita de Joan Lluís Bozzo kie ĉefrolas la aktoroj Biel Duran kaj Marc Pujol.

″Un secret que t'havia de dir” estas kanto verkita de Francesc Ribera Titot kun muziko de Xevi Vila, kiu rakontas realan okazintaĵon de la bosnia milito dum la naŭdekaj jaroj.

La filmeto estas subtekstigita en diversaj lingvoj, inter kiuj troviĝas Esperanto danke al traduko de Òscar Puig.

## REKORDA LIBROTAGO

La 23an de aprilo, okaze de la libro-tago, Kataluna Esperanto-Asocio starigis budojn en Sabadell kaj en Barcelono. Tiu de Barcelono estis starigita en La Rambla samkiel dum pasintaj jaroj. La vendo estis rekorda, kaj la socia varbado ŝajne ankaŭ.

Deĵorantoj donacadis flugofliojn, ekzemplerojn de *Kataluna Esperantisto*, paĝomarkilojn kaj katalunalingvan version de la Universala Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj. La plej vendita libro estis La Eta Princo de Saint-Exupéry. La DVD de E@I vekis la atenton de pluraj preterpasantoj, kiuj ĝenerale montris grandan simpation al nia movado. Pluraj turistoj haltis scivoleme, kaj ili ricevis klarigojn en pluraj lingvoj.

Elĉerpiga sed fruktodona librotago dank' al la sindonemo, laboro kaj helpo de, i.a.,



Àngels del Pozo, Carles Vela, Clara Baylina, Ferriol Macip, Josep M. Milla, Lluís Aragay, Marta Moliné, Michael-Boris Mandirola, Mon Cardona kaj Víctor Solé.

Dum la libro-tago estis prezentita "Agenda de la Terra", mojosa kutura gvidlibro kaj agendo kun proponoj por iĝi agema. La agendo estas eldonita en la kataluna, Esperanto kaj la okcitana. Ĝi estis disvendita en kelkaj budoj kaj librovendejoj. Temas ja pri klara montrilo de la rolo kiun devus ludi Esperanton en nia socio.

Siaflanke, la Muzeo de Esperanto de Subirats disdonis al siaj vizitantoj ekzempleron de la legendo de Sankta Georgo en la kataluna kaj en Esperanto.



*Àngels del Pozo, Mon Cardona kaj Marta Moliné deĵoras en la budo de nia asocio dum la librotago*

## EN MEZLERNEJO

La pasintan 23an de aprilo, tago de Sankta Georgo, Viktoro Solé prelegis pri Esperanto en gimnazio "Bruguers" de la urbo Gavà (apud Barcelono). Antaŭ trideko da gimnazianoj, la preleganto prezentis la ĉefajn trajtojn de nia lingvo kaj ĝia taŭgeco por esti vere neŭtrala internacia lingvo.

Kaj la lernantoj kaj la ĉeestantaj instruistoj montris sian intereson pri la lingvo kaj surpriziĝis pri la potenco de Esperanto, lingvo, kiun, ĝis tiam, ili taksis nur simpligita kodo.



*Víctor Solé prelegas pri Esperanto en gimnazio "Bruguers"*

## EN PRINTEMPA SEMAJNO INTERNACIA

La pasintan paskon, kvar katalunoj partoprenis en Bonn la Printempan Semajnon Internacian (PSI), la ĉiujara renkontiĝo de la germanaj esperantistoj en tiuj tagoj. Mauro, Xavier, Àlex kaj Maria José sukcese partoprenis ankaŭ la kurson por komencintoj gvidata de Àlex Humet.

Ili partoprenis ankaŭ aliajn aktivaĵojn kiel ekskursojn aŭ atelierojn. Ili gustumis la germanajn bierojn kaj konis interesajn homojn. La loko estis bela, ĝi situis en la urbo sed samtempe en arbara naturo. Eblis ludi kun infanoj kaj familioj kaj ankaŭ legi kelkajn librojn en Esperanto.

La plej grava celo, tamen, estis plibonigi sian konon de la internacia lingvo. Tio estis sukcese plenumita.


*Mauro Viadé, Àlex Humet kaj Xavier Alcalde, en Printempa Semajno Internacia*

## FORPASIS DOLORS ORTIZ

Dimanĉon la 6an de majo forpasis nia ĉarma samasociano Dolors Ortiz. Ŝi ĉeestis multnombrajn kongresojn, renkontiĝojn kaj aktivadis ĉefe en sia urbo, El Vendrell, kaj en Vilanova i la Geltrú.

Ripozu pace.

## EN ANDORO

La pasintan 18an kaj 19an de majo grupo de okcitanaj esperantistoj, kun la helpo de Kataluna Esperanto-Asocio, prezentis Esperanton en Andoro cele al revivigo de la esperanto-movado tie.

La 18an de majo okazis prezento kaj ekspozicio en la Kongresejo de la ĉefurbo. La sekvan tagon oni starigis budon en foiro okaze de la tutmonda tago de la kultura diverseco.

Krom andoraj aŭtoritatoj, pluraj homoj vizitis la budon kaj eĉ montris intereson revivigi la malaperintan lokan esperanto-grupon. Tiucele almenaŭ 15 homoj anoncis sian pretecon kunveni kun la esperantistoj postsomere.

Kataluna Esperanto-Asocio estis invititaj ankaŭ starigi budon kaj prezenti nian movadon por lingvaj rajtoj en la Andora Foiro okazonta oktobre.



*La agado de esperantistoj rilate lingvaj rajtoj estis prezentita en Kataluna Socia Forumo*

## EN KATALUNA SOCIA FORUMO

La pasintan 28an de aprilo Kataluna Esperanto-Asocio prezentis kaj pritraktis siajn proponojn pri lingva daŭripovo, lingvaj rajtoj kaj Esperanto en la Renkontiĝoj pri Proponoj de la Kataluna Socia Forumo. La prezento ricevis subtenon kaj simpation de pluraj ĉeestantoj.

La Renkontiĝo pri Proponoj okazis ĉijare en la sidejo de Àgora Catalunya, en la placo de Katalunio en Barcelono, la 14an, 21an, 28an de aprilo, 5an kaj 6an de majo, kie multnombraj anaroj kaj personoj diskonigas siajn proponojn, ideojn, spertojn aŭ projektojn; ĉion ĉi oni videbligas kaj grupe pritraktas. La diversaj prezentoj estas pritraktataj kadre de eroj pri ekologiaj rajtoj, ekonomiaj rajtoj, paco-kulturo, politikaj rajtoj kaj kulturaj rajtoj.

Oni decidis tiun novan formaton de la Kataluna Socia Forumo por rompi rutinojn, doni al ni tempon legi kaj aŭskulti la proponojn de aliaj sociaj sektoroj kaj de aliaj anaroj, kaj tiel pligrandigi nian perspektivon kaj igi nian agadon pli efektivan.




*Grupo de okcitanaj esperantistoj, kun la helpo de Kataluna Esperanto-Asocio, prezentis Esperanton en Andoro*

## EN VILAWEB

Laŭ aprobo en la pasinta asembleo, Kataluna Esperanto-Asocio traktis kun Vilaweb reklam-kampanjon. Laŭ la interkonsento, nia Asocio starigis blogon ĉe la blogaro de Vilaweb, publikigos tri reklamkampanjojn longe de la jaro, kaj uzos la salonon por aranĝoj.

La unua aranĝo tie okazigita, la pasintan 12an de marto, temis pri gazetara konferenco okaze de la 125-jariĝo de la internacia lingvo. Kvankam malmultaj ĵurnalistoj ĉeestis, Vilaweb publikigis la eventon kaj nia asocio sendis gazetaran informon al ĉiuj amaskomunikiloj.